



madrida esperanto-liceo

januaro 2012

MEL FARIĜAS KVINDEKJARA

Dum la jaro 2012 nun komenciĝanta, ni celebros gravan datrevenon: MEL fariĝos 50-jara.

Kvankam jam antaŭe ekzistis aliaj grupoj de Esperanto en Madrido, diversaj krizoj de la madrida klubaro, kaj la deziro ligi Esperanton al kultura ideo, konvinkis la madridajn esperantistojn fondi novan asocion en 1962, kiu sub la nomo **Madrida Esperanto-Liceo** daŭras ĝis nun. Laŭlonge de tiu ĉi jaro 2012 ni esperas organizi diversajn aktivaĵojn por adekvate festi nian datrevenon.

KANALO DE MEL EN JUTUBO

La unua kunmemora agado fakte komenciĝis la 1-an de januaro je la horo 0: MEL inaŭguris propran kanalon en reta videa spaco Jutubo (Youtube), en la adreso <http://www.youtube.com/user/madridaliceo>.

La inaŭgura filmeto estis kanto prezentita de la kvaropo Sinkopo okaze de la Zamenhof-festo 2011, organizita de nia Liceo. Temas pri “La plenumo”, poemo de William Auld kun muziko speciale komponita de Crawford Gates, kiun oni iel povas konsideri daŭrigo de “La espero”, la himno de Esperanto. Se vi posedas filmojn kun rilato al Esperanto kaj Madrido, kontaktu nin, por studi la eblecon aldoni ilin al la dosiero.

ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO

Kiel anoncote en antaŭa numero de *Nia Voĉo*, la 18-an de decembro ni celebris la tradician Zamenhof-feston en Madrido. Trideko da madridanoj kaj vizitantoj kunvenis en la ludoklubo *Da2* en kvartalo Villaverde, inter la 12a kaj la 18a horo, proksimume, por ĝui distran kaj kulturan programon kaj por komune manĝi.

Matene, post bonvenigaj vortoj de la sekretario de Liceo, Manolo Parra, estis inaŭgurita la Libroservo, kiun dum la tuta tago prizorgis Pedro Sanz.

Jorge Camacho prezentis sian laste eldonitan poemaron, “La silika hakilo”, kaj legis kelkajn poemojn el ĝi. Miguel Fernández rakontis pri sia partopreno en omaĝo al Federico García Lorca, organizita de politika partio en Vitorio, memore al la datreveno de ties murdo, kaj deklamis kelkajn poemojn tradukitajn en Esperanton. Fine, Toño del Barrio komentis pri sia partopreno en libro ĵus eldonita de la Ministerio de Defendo, kun biografioj de 25 respublikanaj militistoj, al kiu li kontribuis per biografio de nia iama samlingvano la kolonelo Julio Mangada Rosenörn.

Post la komuna manĝado, oni elsendis du filmojn. Inter ili, menciinda estas “Stranga Nupto”, amatoraĵo filmita de iamaj MEL-anoj ĉirkaŭ 1980, kiu ege amuzis la ĉeestantojn pro sia iom stranga karaktero kun almodovareskaj trajtoj.

Toño del Barrio kaj Raúl Martínez Anguita prezentis la projekton por festado de la 125a datreveno de la lingvo Esperanto, kiun oni planas por 2012, kaj la venontan Hispanan Esperanto-Kongreson, kiu disvolviĝos en Almagro inter la 27a de aprilo kaj la 1a de majo ĉijare.

Kvaropo Sinkopo (Laura Carballo, Paloma Gil, Manolo Pancorbo kaj Pedro Vilarroig) koncertis per ampleksa repertuaro en kiu dominis la kristnaskaj (julaĵ) kantoj, en senriproĉaj esperantaj versioj. Kiel kulmino, Laura akompanis la kantadon, fare de Miguel Fernández, de unu el ties poemoj, kiujn muzikis Pedro Vilarroig. Pluraj el tiuj kantoj estas iom post iom spekteblaj en la kanaloj de MEL kaj Sinkopo en Youtube.

Kelkaj fotoj de la festo estas videblaj en www.ipernity.com/doc/alejandropareja/album/259247 kaj <http://www.ipernity.com/doc/tonyo/11926931/in/album/259189>.

DIVERSLOKE EN HISPANIO

Zamenhofaj festoj okazis en diversaj urboj de Hispanio: Santandero, Valencio, Barcelono, Bilbao, Sevilo, Zaragozo, Guardamar del Segura, Vélez-Málaga, ktp.

Informoj pri Esperanto okazis dum tiuj tagoj en kelkaj amaskomunikiloj, inter kiuj "Muy Interesante", "Universia" aŭ "Vilaweb". Plej grava estas preskaŭ tutpaĝa intervjuo en "El Periódico" de Barcelono, al Alfons Tur, pri la fakto ke li estas denaska parolanto de nia lingvo.

Memoru ke la venontjara Hispana Kongreso de Esperanto okazos de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo en la manĉa urbo Almagro. Diversaj madridanoj partoprenas en la organizado de la programo. Memoru ankaŭ ke dum 2012 ni festos la 125an datrevenon de la publikigo de la Unua Libro de Esperanto. Dum venontaj monatoj ni anoncos la agadojn planatajn en Madrido.

Ne hezitu kontakti Liceon por kunlabori en la planataj agadoj kaj proponi aliajn ideojn.

VIZITIS NIN

Kiel preskaŭ tradicie, dum la kristnaska periodo Tacuo kaj Masumi Huĝimoto, el Japanio, gastis ĉe Jorge Camacho. Rai Rius el Barcelono vizitis nian urbon ĉirkaŭ la jarfinaj festoj.

KURSOJ DE ESPERANTO

Kiel ni informis en pasinta numero, Pedro Hernández gvidos novajn kursojn de Esperanto en la sidejo de Liceo, komenciĝontajn dum monato januaro. La kurso por komencantoj ekos la 28an de januaro kaj daŭros tri monatojn, kun klasoj de du horoj, ĉiusabate. La perfektiga kurso komenciĝos la 8an de januaro kaj funkcios per neĉeesta metodo, kun individua laboro.

Por koni pliajn detalojn kaj akiri la materialon, oni povas aliĝi al la reta grupo *esperantovallekas*, <http://es.groups.yahoo.com/group/esperantovallekas/> aŭ viziti la fejsbukan spacon: <http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid>.

ANONCOJ DE MEL

La jara Ĝenerala Kunsido de Madrida Esperanto-Liceo okazos la lundon 23an de januaro je la 18:30 en c/ Rodríguez San Pedro 13-3-7. Legu alvokon kaj tagordon an aneksa dokumento.

Ni memorigas ke estas tempo por ke la membroj pagu sian rekotizon al la Liceo, ĉu kontante, ĉu per transpago al la banka konto 0081-7110-98-000 126 6730, ĉe Banco Sabadell/Atlántico.

Ankaŭ estas tempo por ke la ne-membroj engaĝiĝu en sia loka E-klubo. La kotizo plu restas senŝanĝa: 12 eŭroj. Aniĝilo estas kunsendata en la aneksa dosiero.

MADRIDA PROGRAMO

La kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la grupo. Atentu krome la specialajn anoncitajn kunvenojn:

- 7-a de januaro, sabate, je la 5-a, babilrondo en kafejo 4D.
- 16-a de januaro, en sidejo de MEL: "Libio antaŭ la milito", Carmen Suárez.
- 20-a de januaro: 2-hora vizito tra la kvartaloj Santiago kaj San Ginés de urbo Madrido.

Pri aliaj novaĵoj en Madrido kaj la mondo, atentu la diskonigojn en la retforumo pri Esperanto en Madrido http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4^oB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com